

Esperanto kaj UN

Informilo de la oficejo de Universala Esperanto-Asocio por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 65, julio-aŭgusto 2023



Universala Esperanto-Asocio

UEA ludis ŝlosilan rolon en kunveno pri multlingvismo kun UN-gvidantoj

Konstrui komunan kompreniĝon per multlingvismo estis la temo de kunveno pri multlingvismo kaj UN la 12-an de junio. Ĉeestis, inter aliaj, la prezidanto de la Ĝenerala Asembleo, la Suba Ĝenerala Sekretario pri Mastrumado de la Ĝenerala Asembleo kaj Konferencoj, la Suba Ĝenerala Sekretario pri Juraj Aferoj, kaj la Suba Ĝenerala Sekretario pri Politiko. La kunveno, kiu okazis virtuale, fontis el kreskanta konscio pri la bezono fortigi la lingvopretecon de UN, tiel ke ĝi povu atingi siajn diversajn publikojn kaj redukti lingvan diskriminacion ene de la organizo.

La kunveno estis organizita laŭ iniciato de la Komitato de Neregistaraj Organizoj (NROj) pri Lingvoj, (substanca komitato de la Konferenco de NROj en Konsulta Rilato kun Unuiĝintaj Nacioj: CoNGO), kaj de la Studogrupo pri Lingvoj kaj UN, fakula reto de esploristoj kiuj specialistas pri multlingvismo. Sponsoris la kunvenon la Konstantaj UN-Misioj de Andoro, Burundo, Ekvatora Gvineo, Ĝibutio, Hispanio kaj Kanado, plus la Konstanta Observa Misio de la Internacia Organizo de Frankofonio (francparolantaj landoj).

Nome de Universala Esperanto-Asocio, d-ro Humphrey Tonkin substrekis la gravecon atingi la civilan socion per lingvoj kiujn la publiko komprenas kaj aŭskulti iliajn zorgojn en lingvoj kiuj estas konvenaj al ties membroj. La Celoj pri Daŭripova Evoluigo dediĉas malmultan atenton al lingvoj, li asertis: sed lingvoj estas esencaj en formado de partnerecoj por atingi la Celojn.

La kunveno mem estis multlingva, kun simultana interpretado en la ses oficialaj lingvoj de Unuiĝintaj Nacioj (angla, araba ĉina, franca, hispana, rusa), plus Espereanto. UEA kunordigis la liveron de interpretado en Esperanto. Gvidis la kunvenon prof. Francis M. Hult, prezidanto de la Komitato de NROj pri Lingvoj kaj reprezentanto de UEA al UN.

Inter la parolantoj estis pintaj gvidantoj de Unuiĝintaj Nacioj, notinde s-ro Csaba Kőrösi, prezidanto de la 77-a Ĝenerala Asembleo. Aliaj ĉefgvidantoj kiuj intervenis estis Movses Abelian, Suba Ĝenerala Sekretario pri Mastrumado de la Ĝenerala Asembleo kaj Konferencoj, kaj Kunordiganto por Multlingvismo; Miguel de Serpa Soares, Suba Ĝenerala Sekretario pri Juraj Aferoj kaj Jura Konsilisto de UN; Guy Ryder, Suba Ĝenerala Sekretario pri Politiko; kaj Lisa M. Bottenheim, Asista Ĝenerala Sekretario pri Subtenaj Operacioj.

Pluraj UN-ambasadoroj kaj iliaj reprezentantoj intervenis: Sofia Margaryan, konsilanto pri humanitaraj aferoj, Konstanta Misio de Armenio; Zéphyrin Maniratanga, konstanta reprezentanto de la Respubliko Burundo; Robert Keith Rae, konstanta reprezentanto de Kanado; Yuri Ariel Gala López, vica konstanta reprezentanto de Kubo; Mohamed Siad Doualeh, konstanta reprezentanto de la Respubliko Ĝibutio; Anatolio Ndong Mba, konstanta reprezentanto de Ekvatora Gvineo; Ana Paula Zacarias, konstanta

reprezentanto de Portugalio; Ana Jimenez de la Hoz, vica konstanta reprezentanto de Hispanio; kaj Ifigeneia Kontoleontos, konstanta observanto de la Internacia Organizo de Frankofonio.

Liberato Bautista, prezidanto de la Konferenco de NROj (CoNGO) sendis rimarkojn.

Pliaj parolantoj estis interalie stabanoj de la Multlingva Agad-teamo de la oficejo de UN en Ĝenevo kaj la Multsektora Regiona Oficejo de Unesko en Bangkoko, plus reprezentantoj de civila socio kaj sciencaj fakuloj. Prezentis siajn rimarkojn en Esperanto reprezentantoj de civila socio prof. Tonkin de UEA kaj Pastro Hans Becklin de TEJO, kaj scienca fakulo Mark Fettes, de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj kaj la Universitato Simon Fraser. Aliaj parolantoj uzis la anglan, araban, francan, hispanan kaj rusan lingvojn.

La kunveno reprezentas la ĝis nun plej ampleksan uzon de Esperanto dum kunveno de gvidantoj kaj asociitoj de UN. Tiusence, ĝi ankaŭ markas momenton de sukceso de la strategio de UEA por antaŭenigi la praktikadon de multlingvismo en UN, tiel malfermante la pordon al uzado de multaj lingvoj, inkluzive Esperanton, por engaĝi pli larĝan perspektivon. Tio estis la ĉefa temo de la kunveno. Kune, la parolantoj pridiskutis la demandon de la rolo de multlingvismo por riĉigi internacian kunlaboron, faciligi la solvadojn de problemoj, kaj profundigi kompreniĝon trans diferencoj.



Esperanto-parolantoj ĉi-jare kongresos en Torino

La norditala urbo Torino gastigos la ĉi-jaran Universalan Kongreson de Esperanto, kies ĉeftemo estos "Enmigrado: kunfluo de homaj valoroj". La Kongreso, la 108-a en la serio (la unua kongreso okazis en Francio en 1905; la venonta okazos en Aruŝo, Tanzanio, en 2024), inkluzivos la jarkunvenojn de la Komitato de la Asocio, teatrajn kaj muzikajn prezentojn, fakajn prelegojn, kunvenojn de la Akademio de Esperanto, kaj abundajn aliajn aranĝojn. La antaŭvidata partopreno jam superas 1100 kongresanojn el 65 landoj. Ĉiuj sesioj okazos en Esperanto. Ligitaj al la kongreso estos Esperantologia Konferenco kaj fakula simpozio, la tielnomata Nitobe-Simpozio. Tiu simpozio, kies lingvoj estos la angla, itala kaj Esperanto, ekzamenos la statuson de realigo de lingvaj rajtoj kuntekste de la 75-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.

La kongreso komenciĝos sabaton la 29-an de julio kaj finiĝos sabaton la 5-an de aŭgusto. La Nitobe-Simpozio okazos en la Universitato de Torino dum vendredo kaj sabato, 28-29 julio. Ambaŭ aranĝojn antaŭos Esperanto-Tago, festata tra la mondo la 26-an de julio, la dato de la publikigo de la lingvo en la jaro 1887. Kunvenos en Italio post la kongreso la esperantista junulara organizo TEJO kaj la esperantista instruista ligo ILEI.



UEA honoros rifuĝintojn okaze de la Tago de Rifuĝintoj

UEA "staras en solidaro kun rifuĝintoj, kiuj ajn, kie ajn, kiam ajn," la Asocio deklaris okaze de la Monda Tago de Rifuĝintoj, la 20-an de junio 2023. La mesaĝo emfazis la rajtojn de rifuĝintoj, precipe "la rajton trovi sekurecon" – kaj samtempe la bezonon trovi komprenon kaj subtenon: "En la nuntempaj socioj, pli kaj pli diversaj, la kapablo interkompreniĝi estas esenca por konstrui komunajn celojn kaj samtempe respekti diferencojn." La mesaĝo emfazis ankaŭ la rolon de la Internacia Lingvo Esperanto por trovi komunan grundon kaj konstrui komunajn celojn por akcepti rifuĝintojn kaj samtempe redukti la kaŭzojn de homa dislokigo.

Fronti migradon: Kuraĝa tagordo por la kongreso de UEA en la jaro 2023

Enmigrado estos ĉefa temo por diskutado en la Universala Kongreso de UEA en 2023. La Asocio anoncis ambician tagordon de informaj sesioj, diskutado kaj planado. Sub la ĝenerala temo "Enmigrado: Kunfluo de Homaj Valoroj" la kongreso, okazonta en Torino de 25 julio ĝis 5 aŭgusto, konsistos el ok partoj, esplorantaj demandojn kiel ekzemple la negativajn kaŭzojn de migrado, precipe klimatŝanĝiĝon kaj naturajn katastrofojn unuflanke kaj perfortajn konfliktojn aliflanke, kaj ankaŭ ekonomian migradon, kaŭzitan de malriĉeco kaj senrimedeco. Fakuloj ekzamenos la mondan ekonomikon de migrado, la defiojn de asimilado, la pozitivajn efikojn de kulturaj fluoj, kaj akcepton de rifuĝintoj en eŭropaj kaj afrikaj medioj.

La sesiojn kunordigos konata ĵurnalisto Thomas Bormann kaj inkluzivos prezentojn de la eminenta juristo Giuliano Turone (Italio), estrarano de UEA Jérémie Sabiyumva (Burundo), vicprezidanto de UEA Amri Wandel (Israelo), kaj multaj aliaj. Ĉiuj prezentoj kaj diskutoj okazos en Esperanto.

Oficejo por rilatoj kun UN, Universala Esperanto Asocio, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017. [1] 212-687-7041. www.esperantoporun.org.